



ESPERANTO NORMANDA BULTENO

n° 173

.unuigo de la normandaj esperantistoj
TRIMONATA BULTENO. BULLETIN TRIMESTRIEL.
de L'UNION des ESPERANTISTES de NORMANDIE.

SEPTEMBRO 1991A. AUTUNO 1991A. N°88A NOVA SERIO.

Minimuma Kotizo por 1991 : 45 frankoj. CCP 283 40 H ROUEN
Sendu vian postcekon rekte al via CCP Centro.
bankcekon al Pierre Quillaud
16, rue Lt Vaisseau Paris 76 120 Le Grand-Quevilly

Redaktas : Yves Nicolas 17-37 Quartier du Bois
14 200 Hérouville St Clair. Tel. 31 95 11 81

LA MONDO KAJ NI

Nia mondo evoluas kiel raketo trans la ĉielo, sed por kien iri?
Muroj eksplodas, ombroj malaperas, sed samtempe novaj konfliktoj starigas
aŭ reaperas. Morgaŭ, kia nia mondo estos ?

Pli ol neniam antaŭe, ni bezonas interkomprenon, toleremon, solidar-
econ, inter la popoloj kiuj emas al suvereneco. Kompreni kaj respekti la alian,
la najbaran popolon, estas ankoraŭ nova nocio por Homaro. Sed ekonomia situacio,
nun tutmonda, kaj evoluo de la moroj devigas nin rilati ĉiutage sur plej multaj
terenoj kun la plej proksimaj kaj malproksimaj popoloj. Ni bezonas unu la
alian. Ne alia vojo alirebla. Solidareco aŭ ĥaoso.

Normanda Ĝenerala Asembleo estas ne rimarkinda evento. Eĉ Universala
Kongreso kuniganta pli ol 2 000 partoprenantojn en Bergen, ne sukcesas atentigi
la ĵurnalistojn !!! Iluzio, do, estus kredi ke Esperanto fariĝos la internacia
lingvo de nia morgaŭa mondo. Sed jam nun, je nia modesta nivelo, devo nia
estas senlace, senĉese, montri kaj elmontri ke homoj per simplaj kaj efikaj
iloj, kiel Esperanto, povas pli facile mildigi la malfacilaĵojn.

Ĝenerala Asembleo de U. N. E. estas okazo uzi la internacian lingvon
en amikeca etoso, interŝanĝi niajn spertojn, antaŭvidi komunajn agadojn por
ke Esperanto pli kaj pli iĝu konkretaĵo je la dispono de ĉiuj.

NI VIN ATENDAS EN LE HAVRE !!!

LE HAVRE 12^{an}~13^{an} de OKTOBRO
ĜENERALA ASEMBLEO

TUJ, RESENDU LA ALIGILON




LE HAVRE : TAGORDO

EN LA SABATO :

- * 16 H 00 : Akcepto de lapartoprenantoj en la loĝejo "La Mailleraye"
- * 17 H 00 : Piediranta malkovro de la urbo
- * 19 H 00 : Komuna vespermanĝo
- * 20 H 30 : Distra parto. Lumbildoj pri Universala Kongreso de UEA en Bergen
Amuzaj ludoj

EN LA DIMANĈO :


- * 09 H 30 : Ĝenerala Asembleo
- * 12 H 30 : Komuna tagmanĝo
- * 14 H 00 : Ni vizitos la najbaran urbeton Montivilliers
- * 16 H 30 : Adiaŭa trinko en la Esperantista ejo



(tradukita el rusingva reklamajo)


LE HAVRE K² UNE 1991

- La plej simpla alirvojo
1. Akceptejo-loĝejo 31 rue de la Mailleraye
2. M.J.C.
3. Urbo-domo
4. Staci-domo trajnoj
5. Teatroj




EN LE HAVRE : ESTU SPERTULO PRI HAVENOJ !!!

La "ESPERANTA BILDVORTARO" de Rüdiger Eichholz entenas terminojn por 25 000 objektoj, difinitaj per bildoj. Ĝi estas neelĉerperbla minejo por scivolemaj esperantistoj.



- | | |
|--|-------------------------------------|
| 1-36 ŝargado kaj malmalŝargado de ŝipoj: | 18 diablo** |
| 1-21 malkaŝa ŝargado | 19 ĉe-nura gruo |
| 1-7 kolara pivot-gruo | 20 pezaĵo |
| 1 gruo-kolono | 21 gruo-loko |
| 2 gruo-trako | 22-36 var-tencaj laboroj |
| 3 decaro-ŝtango | 22 tencajro |
| 4 tun-mekanismo | 23 haven-laboristo |
| 5 ĉefdirekten troydabla grustelo | 24 kaja komizo |
| 6 decaro-ŝtango | 25 ŝipa fraj-tenceto (konosamento*) |
| 7 surŝipa gruo-bazo | 26 peŝino |
| 8 kargo-oficejo | 27 kontrolisto (kontrol-makano) |
| 9 havena trako | 28 mezur-laro |
| 10 kargo-balo (ŝargobalo) | 29 pak-kalibilo |
| 11 ŝtupo** (ring-forma hablo) | 30-36 var-tenceto (kaja magazeno) |
| 12 forkl-trakcento | 30 enŝtelo |
| 13 forka levilo | 31 ŝar-pordego |
| 14 kargo-reto | 32 k. 33 enŝtanta per-lustalo |
| 15 kargo-ĉaro | 32 per-plataĵo |
| 16 kargita hoko | 33 per-motono |
| 17 du-fingra grato | 34 paketo |
| [de haven-laboristo] | 35 malko (var-malko) |
| | 36 (var)-ŝtako |



- | | |
|--------------------------------------|-------------------------------|
| 37-70 ŝtaliaj haven-ŝipoj | [pron.: vof-ŝtalter] |
| 37-46 ŝar-gruo | 54 helic-protektio |
| 37 gruo-brako | 55 blig-kilo |
| 38 kontraŭ-pezaĵo | 56-58 gren-levaĵaro** |
| 38 pivoto | 56 tilo* |
| 40 grustelo | 57 ŝuf-tubo |
| 41 gruo-framo | 58 ŝuf-tubo |
| 42 vinĉejo | 59-62 ram-ŝipo |
| 43 komandilo | 59 ram-turo |
| 44 tuno-plato | 60 ram-masao |
| 45 ŝtako | 61 ghit-reto |
| 46 motorcelo | 62 enŝtanta ŝtako |
| 47-50 malka tren-ŝipo | 63-66 togo-baĝo** (baĝo-ŝipo) |
| 47 protektilo kontraŭ vento | < drag-baĝo |
| (ŝim-baĝo** X guto-tuko) | 63 togo-ĉeno (dragilaro) |
| 48 for-lustelo | 64 togo-ĉeno-reto |
| 49 babordo | 65 drag-togo (dragilo) |
| 50 flank-familio | 66 ŝtalo |
| 51-55 havena tren-ŝipo | 67 ŝim-baĝo |
| 51 ventor-barilo | 68 dragila ŝtalo |
| 52 traboro | 69-70 vagonar-piano |
| 53 mal-mekanismo laŭ Voith-Schneider | 69 (var-ganta*) lev-framo |
| | 70 lev-platforno** |

Kongresaj rezolucioj

La 76a Universala Kongreso de Esperanto, okazinta de la 27a de julio ĝis la 3a de aŭgusto 1991 en Bergen, Norvegio, kun 2295 partoprenantoj el 55 landoj, traktis en pluraj kunsidoj la temon "Nordio - ĉu modelo?" kun aparta emfazo pri la kunlaboro de la nordeŭropaj landoj sur la kampo de trafiko, leĝdonado, esplorado, kulturo, edukado, junularaj interrilatoj, medio-protektado kaj ekonomio;

konstatis, ke la nuntempa nordia kunlaboro baziĝas sur ekvilibro de centriga kaj malcentrigaj fortoj influantaj la nordiajn sociojn;

ke tiu kunlaboro ne limiĝas al oficialaj niveloj, sed instigas ĉiujn tavolojn al partopreno en la plej diversaj sferoj de la socio;

ke tiu kunlaboro konsciigas la nordianojn ĉiam pli pri ilia komuna kultura heredaĵo;

ke la kulturo de la nordiaj landoj historie kaj enhave estas konsistiga parto de la eŭropa kulturo;

konkludas, ke la nordia kunlaboro en ĉiuj gravaj kampoj de la socia vivo emfazas samtempe la memstarajn identecojn de la nordiaj socioj kaj iliajn proksimajn kulturajn rilatojn kaj tiel povas doni modelon al aliaj eŭropaj popoloj en iliaj klopodoj pri regiona kunlaboro;

deklaras, ke tia celado harmonias kun la opinio de Universala Esperanto-Asocio, ke malsamaj kulturoj devas havi la eblon pluekzisti kaj disvolviĝi paralele al la tendenco formi pli vastajn unuiĝojn de la popoloj en ekonomio kaj interkomunikado;

kaj krome atentigas, ke la internacia lingvo Esperanto utile servis al pli ol 2000 homoj el la tuta mondo por la interŝanĝo de scioj kaj opinioj.

La 76a Universala Kongreso de Esperanto, okazinta de la 27a de julio ĝis la 3a de aŭgusto 1991 en Bergen, Norvegio, kun 2295 partoprenantoj el 55 landoj,

konstatas, ke por la unua fojo post la Dua Mondmilito en okcidenta Universala Kongreso de Esperanto partoprenas granda nombro de homoj el la orienta parto de Eŭropo;

ĝojas pro tiu ĉi fakto, kiun ebligis la politika evoluo de la lastaj jaroj;

emfazas la kontraston inter la harmonia etoso, kiu karakterizis la kongresajn laborojn, faritajn de homoj el tuta Eŭropo kaj aliaj partoj de la mondo en la internacia lingvo Esperanto, kaj la konfliktoj, kiuj malhelpas la homan kunvivadon en diversaj regionoj de Eŭropo;

atentigas pri la neceso solvi la daŭrantajn konfliktojn per interparoloj en spirito de toleremo, kunlaboro kaj paco.

(ĉi-sekve nur por interna disvastigo:)

bonvenigas la lastatempajn ŝanĝojn en centra kaj orienta Eŭropo, kiuj malfermas al la tutmonda Esperanto-movado novajn fontojn de homaj rimedoj, kaj ebligas al la loĝantoj de tiuj landoj pli fortan engaĝiĝon en la laboro de UEA;

alvokas al ĉiuj esperantistoj plene utiligi la ŝancojn estigitajn per la malfermiĝo de landlimoj kaj la forfalo de politika diskriminacio, ekz. multnombro partoprenante en diverslandaj renkontiĝoj, kaj tiamaniere kontribui al la fortikigo de tuteŭropa solidareco;

rekomendas al la Landaj Asocioj de Eŭropo intensigi la interŝanĝon de spertoj cele al venkado de malfacilaĵoj fontantaj el la politikaj ŝanĝoj, kaj raportoj siajn atingojn post unu jaro.

Groupe d'Action pour l'Espéranto (G.A.E.)
123, rue de Royan, 16710 Saint-Yrieix
Tél.45.95.41.82 (Association loi de 1901)

SEPTEMBRE 1991

Le "PIN'S" du G.A.E.
=====

Nous devons profiter de l'engouement actuel pour ces petits objets dont la vocation essentiellement publicitaire ne doit pas être confondue avec l'insigne espérantiste (simple étoile verte) moyen de reconnaissance entre locuteurs de l'E-o.

La particularité du "Pin's" (très recherché par les collectionneurs) est l'ingénieux système de fixation en 2 parties à un endroit quelconque du vêtement.

Le message laconique qu'il diffuse en fait un vecteur de publicité particulièrement efficace et exceptionnellement avantageux, voire rémunérateur, contrairement à bien d'autres procédés publicitaires.

Nous pensons que celui que nous avons réalisé plaira et sera porté ou exposé volontiers, contribuant ainsi efficacement à la notoriété de l'espéranto.



Il se présente aux dimensions ci-contre. Fond or (laiton), triangle blanc contenant, en vert, le mot ESPERANTO et l'étoile; en couleur fuchsia les mots "La langue...internationale".

D'un tirage limité, il sera disponible à partir du 15 octobre 1991 (plus tôt si possible) et sera fourni dans la limite de son tirage aux conditions suivantes:
12 Frs l'unité (par 10 unités minimum) + frais d'envoi Frs 7,50 pour 12 unités
ou Frs 14,00 au-delà de 12 U.
pour tout envoi "RECOMMANDÉ", il conviendra d'ajouter Frs 16,50 mais cela est facultatif et laissé à l'initiative de l'intéressé-e.

NOTE- Afin d'éviter à nos correspondants d'avoir à nous interroger sur le mode de distribution de ces objets; nous ajouterons que les "Pin's" peuvent être vendus, mais nous ne saurions indiquer une "cote" quelconque. Dans nos associations à but non lucratif, on peut considérer que la plus-value résultant de la vente de ces objets est destinée à couvrir le coût des "Pin's" offerts ou autres dépenses de publicité.

BON DE COMMANDE

Nom et Prénom

Adresse


Commande"Pin's" du G.A.E., à 12 Frs	
+ frais d'envoi (7,50 pour 12 U. ou 14 Frs au-delà de 12 U.) ..	
+ (facultativement) Frs 16,50 "Recommandé"	

TOTAL :
=====

Païement ci-joint par chèque bancaire ou CCP (sans N° de compte)

Nia amiko Alphonse Legret ricevis tiun leteron de sia sudaŝrika korespondantino. Tia informo povas utili al pluraj inter ni.

7



ESPERANTO-KLUBO-SURMONTETA



GREEN LEVEL, STUDENTS UNION
UNIVERSITY OF CAPE TOWN
PRIVATE BAG
7700 RONDEBOSCH
REPUBLIC OF SOUTH AFRICA



La "ESPERANTO-KLUBO SURMONTETA" ĉe la Universitato de Kaburbo, kore salutas niajn Samideanojn.

La Esperanto-Klubo Surmonteta estas tute nediskriminacianta klubo, dediĉata al la antaŭenigo de la scio kaj uzo de la internacia lingvo, Esperanto. Ni bone scias ke la lokiĝo de Sudaŝriko je la plej suda pinto de Afriko (kaj ankaŭ la politika situacio) izolas nin de la mondo. Tial, por plibonigi komunikadon kaj rilaton inter la Esperantaj kluboj tra la tuta mondo, ni nun petas vin por via kunlaboro en la produktado de novaĵgazeto.

Ĉi tiu gazeto estas eldonata de partoprenantaj grupoj. Ĉiu partoprenanta klubo ricevos ekzempleron de la gazeto. La unua eldono prezentiĝos je junio aŭ julio 1991, kaj poste aperos du-monate, tiel donante unu monaton por kompilado. Kompreneble, partoprenuloj ne povos kontribui aĵojn por ĉiu eldono, tamen por bonega, sen-interrumpema antaŭen-irado, bv peni kontribui tiel ofte kiel eble.

La kontribuajtoj prefere estus tajpitaj sur A4 (210 x 297 mm) paperformato. Ilustraĵoj, grafikaĵoj, bildstrioj kaj nigra-blankaj fotoj estas tre bonvenaj. Bv limigi artikolojn al pli-malpli 1000 vortoj. Ekzemploj de temoj estas: lokaj novaĵoj, lokaj opinioj, okazaĵoj pasintaj aŭ venontaj de via klubo aŭ societo, kiel ekzemple kongresoj, kunvenoj, ktp. Krome, bv noti ke la gazeto ankaŭ havas lokon por korespondpetoj kaj reklamoj kies kostetojn ni baldaŭ anoncos.

Por helpi la kaburbajn kompilulojn kaj editorulojn, ni fiksos limdaton por ĉiu eldono. Ni ĉi-kune avizas vin ke la unua limdato estas **lundo, la 8a de aprilo, 1991**. Pluaj limdatoj aperos en la venontaj eldonoj.

Por la unua eldono ni invitas niajn legantojn sendi sugestojn por la nomo de tiu gazeto. Ni ankaŭ alvokas la ete pli riĉajn interesiĝulojn sendi monan helpon (aŭ helpeton) por la publikigaj kaj presaj kostoj. Kompreneble, ni certe ne atendas tian helpon antaŭ ol la unua numero aperos kaj dissendiĝos, per tio montrante vin la formaton de la gazeto, sed eble poste, se la gazeto plaĉas al vi, vi povus helpeti kun ekz. la kosto de la alfranko.

Ni fidas al via konsidereco kaj plej donacema subteno. Bv doni al ĉi-tiu temo vian plej urĝan atenton. Kaj bv kompletigi la sekvantan respondilon kaj sendi ĝin al la adreso je la leterkapo, tial ni povos vidi la interesecon.

Le Havre

ALIĜILO

12.13 Octobre

(à renvoyer pour Le 15 Septembre, s. v. p.)

NOMO (Nom) :

PERSONA NOMO (Prénom) :

ADRESO (Adresse) :

TELEFONNUMPERO (Téléphone) :

SUBSKRIBO :
Signature

AKOMPANOS MIN : Indiku kiom da personoj (indiquez le nbre de personnes vous accompagant)

☐

Mi deziras partopreni la Ĝeneralan Asembleon de U. N. E., laŭ la subaj kondiĉoj. Je partecipe al l'A. G. de U. N. E. selon les conditions suivantes :

	<u>PREZO</u>	<u>KIOM</u> <u>DA PERSONOJ</u>	<u>SUMO</u>
<u>SABATON</u> (le samedi)	55,00	X	=
*Nokto + matenmanĝo (nuit + petit déjeuner)			<u>SUMO</u>

+

<u>MI MANGÔS</u> (je mangerai)	<u>PREZO</u> (prix)	<u>KIOM</u> <u>DA PERSONOJ</u>	<u>SUMO</u>
<u>SABATON VESPERE</u> Samedi soir	65,00	X	=
<u>DIMANĈON TAGMEZE</u> Dim. midi	75,00	X	=
			<u>SUMO</u>

+

<u>ALIGKOTIZO</u> (cotisation)	55,00	X	=
			<u>SUMO</u>

Mi pagas la tutan sumon al (je verse la somme totale à)

" GROUPE ESPERANTISTE DU HAVRE "

+

La ĉekon mi sendas al (je retourne ce chèque et ce bulletin à) : SYLVIE CARON
44, rue Gustave Lennier
76 600 LE HAVRE

ENTUTE